

Oktobra estrarkunsido

Ekde la 10-a ĝis la 12-a de oktobro 2010 kunsidis en Herzberg la prezidanto StefanMacGill kun du ceteraj estraranoj, Zsófia Korody kaj Radojica Petrović. Ĉiuj tri ankaŭ prelegis en TORPEDO-6 kaj ILEI-seminario pri subvencipetado.

Kvankam senkvorume, la tri estraranoj detale traktis brulantajn temojn el la ILEI-vivo. Iliaj konkludoj kaj proponoj estos prezentitaj al la ceteraj estraranoj por plutrakto kaj apobo. Nova kunsido estas planata por marto aŭ aprilo 2011, por kiam nepros certigi kvorumon.

Estis traktataj temoj pri membraro, sekcioj, komitato kaj komisionoj, financo, konferencoj kaj novaj projektideoj kaj edukiniciatoj. Pli detalaj informoj aperis tuj post la kunsido en la retejo de ILEI:

<http://ilei.info/novajxoj/Herzberg2010okt.php>. (teksto legebla sube)

Resume kaj plej grave:

- La membronombro en 2010 kreskis, sed ankoraŭ necesas pli fidinde konfirmi la membrarliston kaj statistikon. Estas planata varbkampanjo kiu estos turnita enen kaj eksteren de ILEI.
- Krom dudeko da bone funkciantaj sekcioj, ni havas kelkajn praktike ne funkciantajn (Irano, Rusio, kun neklara situacio en Britio), aliĝpetojn aŭ aliĝintencojn el kvin aliaj landoj kaj ŝancojn nomumi reprezentantojn en serio da aliaj landoj.
- La lerneja komisiono celas revivigi sin post la sukcesa dumkonferenca kunsido pri lerneja agado en Matanzas.
- La buĝetpropono por 2011, krom la ceteraj ĉiujaraĵoj, antaŭvidas sumon por volontula laboro kaj financon subtenon al la Interkultura Centro Herzberg, rete bazita instruista trejnkurso de edukado.net kaj Interlingvistikaj studoj en Poznan.
- Post la programe kaj finance sukcesa Konferenco 2009 kaj programe sukcesa konferenco 2010 kun ankoraŭ ne konata financa rezulto, ampleksaj preparoj estas faritaj por la konferenco kaj simpozio 2011 kaj la aliĝado startigita.
- La ĉina sekcio de ILEI sendis allogan oferton por la konferenco 2012.
- ILEI iniciatis kaj pli konkrete lanĉos E-instruan projekton Esperanto 125 okaze de la 125-jariĝo de la Unua Libro.

Protokolis kaj raportas

Radojica Petrovic'

Estraranoj en Herzberg

Sukcese venis al fino Torpedo 6. la faka semajnfino de la germana ILEI-sekcio. kiu samtempe servis kiel la unua Seminario pri Subvenci-Petado (SPSP) organizita de ILEI. Ni venas nun al la lasta tago de 18-hora kunsidado de tri estraranoj de ILEI, kiuj pritaksis kaj planas la ligan laboradon.

Pri membraro: Ili konstatis ke la membronombro laŭ alvenintaj pagoj proksimas al 700, kaj certe atingos 730 kaj kredeble 750 ĝis la jarfino. [SMG: efektive okazis]. Bona rezulto kompare kun 674 en 2009. La kunveno precizigis la bezonojn pli bone sekurigi la datumojn kaj disponigi ilin diversforme al estraranoj por ka alikampaj projektoj povu progresi. Notite la bezono regule ricevi la aktualan laŭlandan statistikon. Decidite la konturoj de varbkampanjo por la jarŝanĝa periodo.

Pri sekcioj: dudeko funkcias adekvate ĝis bonege, pleje bezonas atenton Britio, Irano kaj Rusio. Aliĝpetoj venis el Serbio, Hispanio kaj povos veni el Kongo DR, Armenio, Meksikio kaj kelkaj pliaj. Ni survojas al nomigo de reprezentanto. el Bulgario [SMG: Okazis ekde 1 jan 2011] kaj deziras tion en Slovakio, Nepalo, Vjetnamio kaj serio de Latin-Amerikaj landoj.

Pri la komitato: restas ĉ. 14 vakaj lokoj plenigendaj. ILEI okazigas fizikpoŝtan voĉdonon pri deko da proponoj aŭ dokumentoj. [SMG: La sekretario tuj dissendos tion: 24 Jan, 2011]. Inter ili regularo por reta voĉdonado. Ni aŭdis pri planoj ampleksigi la Terminaran Komisionon laŭ diskutoj en KAEST (scienca kunsido en Slovakio novembre).

Pri financo ni dankas la nederlande revizoritajn spezkontojn por 2009

kaj demandas kiam riceveblas revizora raporto por la svedaj kontoj (nur parto de la bilanco kaj fondusoj). La kunsido proponas malnetan buĝeton por 2011 al la tuta estraro, kiu rafinos ĝin, ĉefe surbaze de indikoj pri la fiancaj evoluoj en la nuna jaro. Tiu proponbuĝeto entenas kelkajn novaĵojn – konkretigon de la rilato inter ILEI-ICH (Interkultura Centro Herzberg) kaj ILEI-edukado.net, pli specife kun sumo rezervita por kovri koston de honorariata helpanto, se trovata (unu el nepraĵoj en la Novjara saluto) 2010 [SMG: kandidato nun estas] kaj sumo por subteni la lanĉatan rete bazitan instruistan trejnan kurson (RITE). La tradiciiĝanta apogo de ILEI por universitataj . kursoj en Poznano pluiras, espereble en partnereco kun UEA. Nunaj imagoj estas paŭzigi unu jaron la 1-jaran instruisto-trejnan kurson por koncentri ĉiujn energiojn + subtenojn al la 3-jara interlingvistika kurso, kiu okazas ene de la oficiala universitata programo kaj sekve kies sukcesa lanĉo estas nepra.

Pri konferenco en Kopenhago tra baldaŭ ni anoncos la aperon de elektronika alighilo kaj detalaj informoj. [SMG: delonge okazis] Buĝeto kaj skiza programo estas ellaboritaj. La konferencejo estos en la Universitato. de Kopenhago kun du ofertoj por loĝigo. En la vendredo + sabato matene okazos simpozio, organizita komune de ILEI, la universitato kaj espereble UEA [SMG: Tio transiris de UEA al CED] al kiuj konferencanoj estas aŭtomate aligitaj, kune kun aliaj simpoziaj aliĝintoj (la simpozio funkcios kiel neoficiala antaŭkongresa aranĝo de UK).

Konferenca temo: „Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado”

Simpozia temo: „Lingvo de scienca komunikado kaj edukado”.

La estraro ricevis allogan proponon el Ĉinio por 2012 laŭ tri variantoj – tion la estraro atente studos, kune kun eventuale alvenintaj aliaj proponoj.

Fino de la komunikado

sekvas la tagordo por la kunsido – vaste dissendita antaŭ la kunsido

TAGORDO por Estrarkunsido de ILEI

Herzberg, Germanio, 10-12 Okt., 2010

Atendataj: Stefan MacGill (SMG), Radojica Petrovic (RP), Zsófia Kóródy (ZK).

Neĉeestontaj estraranoj indikitaj sigle en la tagordo estas petataj anticipe sendi raportojn/proponojn. Aliaj siglitoj estas invitataj sendi informojn/petojn.

Dimanĉevespere, Okt 10

1. Malfermo kaj Bonvenigo

- 1.1 Bonvenigo kaj konfirmo de tagordo.
- 1.2 Protokolado kaj raportado.
- 1.3 Protokolo el Roterdamo, kontrolo de decidoj (SMG)

2. Sekcioj kaj membraro

- 2.1 Laŭlanda membrostadistiko por nuna kaj antaŭa jaro (sekretario liveros)
- 2.2 Analizo kaj planoj por varbado: retmembroj, paperaj membroj, dumvivaj membroj.
- 2.3 Honoraj membroj – proponoj 2011.
- 2.4 Manieroj kompili, regule ĝisdatigi kaj sekurigi la membraron.
Akceptigo de principoj kaj laborpraktikoj
Kunadresa storado, senadresa storado, pasvortoj, aliroj
- 2.5 Sekcioj, bone kaj nebone funkciantaj.
Bone: Brazilo, Ĉinio, Francio, Germanio, Hungario, Korea R., Pollando, Ukrainio.
Bezonas atenton: Britio, Irano, Rusio (JH/RP)
Malcertaj – demandoj starigotaj al MJK – Brazilo, Finnlando, Ukrainio.
- 2.6 Aliĝpetoj de sekcioj, planoj por reprezentantoj.
Ricevitaj petoj: Hispanio, Serbio,

- Ricevindaj petoj: Armenio, Kongo DR, Meksikio,
 Argentino
 Rerezentantoj: Bulgario, Slovakio, latinamerikaj landoj,
 Vjetnamio...
- Pretigo de gvidilo pri fondo de grupo kaj nomigo de
 reprezentanto.
- 2.7 LS raportoj 2009 kaj 2010
 Nova demando por 2010: enlanda distribulisto? Helpo
 starigi hejmpaĝojn?
 Meĥanismo ke sekcioj ne perdu tempon ĉe demandoj
 responditaj en 2009.
- 2.8 Komunikado kun sekcioj kaj membroj.
 Listoj, Facebook, Ipernity.
- 2.9 Kontinent-nivelaj iniciatoj: Latinameriko, Afriko, Azio.
 Seminariaj sekvo-planoj por Latinameriko (RP/MS)
 Enplekto de fakaj kapabloj ĉe kubanoj (JH)
 Afrikaj planoj por 2011 (RP)
- 2.10 La bazo por kotizotarifoj (origino, loĝloko aŭ lando de sekcio?).
[\[SMG: Decidita: loĝlando\]](#)
- 2.11 Kondiĉoj kaj eblecoj por havi ambau variaĵojn samtempe (rete,
 papere)
- 2.12 Aliaj ofertoj ĉe la reta membreco – aldono de son- kaj vid-
 materialo – plia ofteco?

Lunde ekde 9 atm, Okt 11

3. Komitato kaj komisionoj

- 3.1 Kompletigo. Resumo pri nomitaj komitatanoj.
 Mankantaj komitatanoj: BE1, BR4?, GB0*, CZ1?,
 CN2, IR0*, IT+1, KR2, HR?, CU?, SE1,...
- * = unue devas prizorgi kvin membrojn.
- 3.2 Organizado de la komitata voĉdonado pri kubaj decidoj.
 Malneto de la voĉdonilo (SMG) - [farita](#)
 Plano por pretigo de la adresaro, sendolando (MJK?)
- 3.3 Enkonduko de reta voĉdonado.

Ebloj ĉe retaj servoliverantoj; ĉe Guglo, Yahu, E ĉe I...
Bezonoj: alireblo, sekreteco, rekontrolo, aŭtomata
nombrado...
Alternativaj planoj per reta voĉdonado, kiel antaŭvidis
la regularo.

- 3.4 Regularaj modifoj
 - Pretigo de gvidlinioj por la komisiono
 - Modernigo de helikpoŝtaj postuloj – anakronismaj
limdatoj
- 3.5 Komisionoj – raportoj: Lerneja Komisiono (JH), Terminara
Komisiono (RP): Universitata Komisiono (DC); UN
Komisiono (RM), Scienca Komitato por IPR, aliaj...

4. Financo – komenca traktado

- 4.1 Spezoj por 2009 - Kasisto liveris. Stato de sveda revizado.
NL en ordo. Afiŝigo.
- 4.2 Raporto pri la stato 2010 laŭ la nunjara buĝeto. Kasisto liveras.
- 4.3 Antaŭplanado kaj buĝetoj por 2011 – retkurso, oficisto, aliaj
revizioj.
- 4.4 Kasoj kaj fondaĵoj, bilanco, Koleghelpa Kaso. Donac-
kampanjoj.
- 4.5 Konferencaj spezoj kaj buĝetoj.
- 4.6 Financa disponigo de UEA por sekva jaro.
- 4.7 Estonto de la svedaj kontoj

5: Estraro

- 5.1 Ritmo de taskplenumado. Neplenumataj taskoj, kiel trovi
volontulojn. (SMG)
- 5.2 Difino de taskaroj de estraraj postenoj. Tekstoj ekzistas por
sekr, kasisto, prez.
- 5.3 Pretigo de la sekva estrara jarraporto. (MJK, SMG, ĉiu)
- 5.4 Estrara komunikado kaj funkciado; laŭmonataj planoj, afiŝigo
de bazaj dokumentoj, regulaj retkunvenoj.
- 5.5 Financado de la estrara laboro.
- 5.6 Strategio kaj vizio por la ligo: “Kia ILEI en 2015?”

5.7 Loko kaj dato de sekva estrarkunsido – printempo 2011?

Marde ekde 9 atm, Okt 12, posttagmeza fino.

6. Konferencoj

- 6.1 Pasinta konferenco, efikoj, financa rezulto, sekvendaĵoj.
(kontribuo AM bonvena)
- 6.2 Sekva konferenco: LKK, buĝeto, kotizoj, aliĝiloj, informoj,
liverplanoj (RP)
- 6.3 Simpozio, seminario, lingva festivalo – suplementaj eroj. (RP)
- 6.4 Postvenontaj konferencoj. (RP) – proponoj, decido pri 2012 ĝis
jarfino!
- 6.5 ILEI-agado en la sekva UK: TdL, budo, IKU, simpozia
postsekvado.

7. Movadaj rilatoj

- 7.1 Rilatoj kun UEA kaj la Strategia Plano. (SMG)
- 7.2 Rilatoj kun TEJO, AIS, SAT, ISAE, LIBE ks. (ĉiu)
- 7.3 Rilatoj kun retejoj: E@I, lernu net, edukado.net, Springboard,
AKEL, Interkulturo... (RP)
- 7.4 Rilatoj kun kurscentroj kaj eventoj: Herzberg, Gresillon,
SES,...(ZK/RP)
- 7.5 Projekto Esperanto-125. (SMG)

8. Eksteraj rilatoj

- 8.1 rilatoj kun FILPV, AATE, aliaj (DC)
- 8.2 rilatoj kun UN, Unekso kaj iliaj naciaj sekcioj (RM)
- 8.3 Starigo de moderna eksterenrigarda multlingva ILEI-retejo.
(tekstoj, teknologio) (SMG/RP/ZK)

9. Eldona agado

- 9.1 Simpoziaj kajeroj – principaro (verkita), enpaĝiga gvidilo
(verkota) (SMG/JN)
- 9.2 Detala Gramatiko. Pago kaj stokoj? (JB/ZK). ŝuldata al AB!

- 9.3 IPR – verkado de enkondukoj (JN/SMG)
- 9.4 Juna amiko (GK/SMG)
- 9.5 Rezultoj de SPSP? Gvidilo pri subvencipetado? (ZK)

10. Eduka agado

- 10.1 Lerneja agado, projektoj, kunlaboro, registrado de klasoj.
(JH,ZK, ĉiu)
- 10.2 Instruista trejnado, planoj, UAM, reta trejnado.
(ZK,SMG,KK,IK...)
- 10.3 Ekzamenoj, KER, ILEI, estontaj sesioj, eldonaĵoj,
diskonigado.
- 10.4 Universitata agado. (DC)
- 10.5 Aliaj edukaj iniciatoj. (ĉiu)

11. Aliaj temoj

Fino de tagordo.